

 <p style="text-align: center;"><b>Esperanto</b></p> <p style="text-align: center;">en la servo de La Dia regno</p> <p style="text-align: center;"><b>Monataj raportoj</b></p> <p style="text-align: center;">pri la disvastiĝo de Esperanto inter la</p> <p style="text-align: center;"><b>Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj.</b></p> 		
Nro. 1—2.	Februaro-Marto 1908.	Unua jaro.
<p><b>Jarabono:</b> 50 spesdekoj (sd) Unu numero: 5 sd.</p>	<p>1) Esdonanto: <b>P. Hübner.</b> Mülheim a. Rhein (Germanujo) Friedr. Wilh. Strasse 66.</p>	<p>Oni abonu per postmandato</p>
<p>1 spesmilo (sm) = 100 sd = 2 markoj = 2 ŝilingoj = 2,50 frankoj.</p>		
<p><b>Al la karaj amikoj kaj samideanoj!</b></p> <p>Kun multe da ĝojo kaj danko al nia Dio ni sciigas al vi, ke nun Esperanto iom post iom eniras en niajn unuiĝojn. Nia disvastiĝa laboro komencita per helpo de Dio, ĉiam plimultiĝas kaj jam ne estas eble, informi ĉiujn amikojn per poŝtkartoj aŭ leteroj pri la progreso de Esperanto inter niaj unuiĝoj.</p> <p>Tial ni decidis, eldoni Esperantan gazeton por nia afero, esperante, ke niaj samideanoj volonte penos, kolekti kiel eble plej multajn legantojn.</p> <p>Ni petas nun niajn karajn amikojn, afable kaj kiel eble plej ofte sendi al ni sciigojn pri disvastiĝo, instruo, uzo k. t. p. de Esperanto en iliaj unuiĝoj, por ke ni povas pliriĉigi niajn raportojn.</p> <p>Plue ni petas, afable sciigi al ni ĉiujn adresojn de Esperantistoj en la „Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj“ (K. U. J. V.), ĉar ni intencas, eldoni baldaŭe Esperantistan adresareton de nia mondligo.</p>		
		

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel Polnický;

✉ Na Vinici 110/10,  
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;

☎ +420 325 615 651;

✉ Cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,  
DE 74074 Heilbronn, Germanio;

☎ +49 7131 162688;

✉ SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- \* Membro-subtenanto €30,- \* Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- \* pagante al Libroservo €18,- \* Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. \* Se estas en via lando UEA-poŝtĵirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI \* Nederlanda poŝtĵirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;

☎ +46 (70) 2004574;

✉ dr\_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel Polnický

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

La protestanta Esperanto-movado	3
Finrimarko el la unua Dia Regno	4
Ĉu Esperanto estas di-regna?	5
Seneliraj vojoj	12
Ĵus aperis noveldono de preĝlibreto de Jelly Koopmans-Schotanus	13
Ĉu aktuala la londona esperantigita Biblio?	14
58-a kongreso de KELI	15
Unu leterkarto	16
Prediko de Erikas Laiconas	17
Gvidilo de la Gideon-anoj	20
Informetoj	22
Nekrologo Hilda Tharme	22
Nekrologo Erikas Laiconas	23
Se donas Di' al vi favoron	24

## REDAKTORAJ VORTOJ

Cent jaroj pasis de post la unua “Dia Regno”. Estas granda honoro por mi esti redaktoro kaj esti unu el multaj sekvuloj de Paul Hübner, la fondinto de Dia Regno. Mi ŝatus, kompreneble kun via helpo, iom respeguli tiujn 100 jarojn kaj precipe kion la gazeto Dia Regno signifas por ni kaj nia KELI. Do sendu al mi kion vi spertis kaj kion vi opinias dum via legado de Dia Regno. Ĉu vi poste nur forĵetas ĝin, donas al iu alia, uzas ĝin en kurso? Ĉu vi iam tradukis iun artikolon el ĝi? Certe ne nur mi interesiĝas. Sendu al mi fotokopion de iu artikolo kion vi ŝatus denove vidi en Dia Regno aŭ vi mem verku ion!

Certe vi jam rimarkis ke publikigitaj artikoloj prezentas multajn diversajn pensmanierojn. Mi volas ke vi notu ke nur la aŭtoro respondecas pri la enhavo kaj ne redonas la ideojn de la redaktoro.



## La protestanta Esperanto-movado – la komenco

El la libro *Esperanto – la nova latino de la eklezio*  
de Ulrich MATTHIAS, DE

**A**nkaŭ protestantaj kristanoj, kiuj lernis kaj aplikis Esperanton, fondis jam en la komenco de la 20a jarcento internacian ligan. La estiĝo de tiu ĉi ligo estas forte ligita al YMCA, la Kristana Asocio de Junaj Viroj. En 1906 la sekretario de la Centra Komitato de YMCA en Ĝenevo, Barono W. von Starck, vizitis la Duan Universalan Kongreson de Esperanto en sia loĝurbo. Li tuj konvinkiĝis pri la valoro, kiun Esperanto povus havi por lia asocio, kaj en januaro 1907 li publikigis tre favoran artikolon pri Esperanto en kelkaj YMCA-gazetoj. Baldaŭ ne malmultaj anoj de la asocio interesiĝis pri la lingvo, kelkaj serioze lernis ĝin kaj serĉis korespondantojn inter samkredanoj. En februaro 1908 la germana inĝeniero Paul Hübner (1881-1970) el Mülheim ĉe Rejno (nuntempe urboparto de Kolonjo) komencis eldoni malgrandan gazeton kun la titolo “Esperanto en la servo de la Dia Regno”. Ĝi celis, kiel emfazis Hübner, esti “ligilo inter ĉiuj kristanaj samideanoj”, “komuna informilo pri la

kristana vivo en ĉiuj partoj de la tero”, kaj “gvidisto al Jesuo Kristo kiel nia sola Savinto”.

Same kiel en la katolika, tiel ankaŭ en la protestanta Esperanto-movado oni fondis gazeton pli frue ol asocion. Kaj ankaŭ ĉi tie la laboro de redaktoro kaj administranto dum longa tempo pezis sur la ŝultroj de unuopulo, kiu pretis transpreni kaj la laboron kaj financajn perdojn. Ĝis la fino de 1908 Hübner trovis iom pli ol 80 abonantojn en 12 landoj, kaj ekde januaro 1909 li eldonis la gazeton sub la mallongigita nomo “Dia Regno”, sub kiu ĝi aperas, kvankam kun fojaj interrompoj, ĝis hodiaŭ.

En la 7a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno okazis la 25an de aŭgusto 1911 kunveno de protestantaj esperantistoj. Tie oni unuanime akceptis la ideon fondi internacian kristanan asocion. En la sekvaj monatoj okazis viglaj leteraj diskutoj pri la statuto kaj la nomo de la organizo; oni fine interkonsentis pri “Kristana Esperanista

*Tiu ĉi esperantlingva versio de la germanlingva libro "Esperanto - das neue Latein der Kirche" aperis en presita formo en julio 2001 ĉe Flandra Esperanto-Ligo. Ĝi haveblas je EUR 7,50 (inkluzive de la sendokostoj) ĉe la aŭtoro [Ulrich.Matthias@t-online.de](mailto:Ulrich.Matthias@t-online.de) kaj je simila prezo ĉe multaj esperantaj libroservoj. La libro estas ankaŭ havebla en kelkaj aliaj lingvoj.*



Ligo”, mallonge KEL. (En 1923 tiu ĉi nomo estis ŝanĝita al “Kristana Esperantista Ligo Internacia”, mallonge KELI.) La oficiala fondo de KEL okazis nur du jarojn post la kunveno en Antverpeno, la 24an de aŭgusto 1913 en la Universala Kongreso en Berno; Paul Hübner elektiĝis tie prezidanto. Kiel sian fondodaton KELI tamen tradicie rigardas la 25an de aŭgusto 1911.

Grava evento por kristanaj esperantistoj de ĉiuj konfesioj estis la eldono de la esperantlingva Nova Testamento en Esperanto en 1912. En 1909 angla komitato sub gvido de pastro John Cyprian Rust (ĉ. 1850-1927) komencis la tradukadon, kaj iom pli ol tri jarojn poste aperis “La Nova Testamento de nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo”. La unua eldono de 5.000 ekzempleroj

estis elĉerpita ene de malmultaj monatoj.

Ankaŭ por KEL tio signifis progreson. La kunlaboro kun YMCA en organizado de Esperanto-kursoj funkciis tre bone; komence de 1914 la centra komitato de YMCA eĉ oficiale rekomendis “la disvastigon de Esperanto en ĉiuj YMCA-uniĝoj”. Kadre de la 10a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo, al kiu aliĝis 3739 homoj, devis okazi plia kunveno de KEL kaj renkontiĝo kun parizaj reprezentantoj de YMCA. Sed same kiel la IKUE-Kongreso en Lourdes, ankaŭ tiu ĉi Universala Kongreso ne povis okazi. Kaj same kiel ĉe “Espero Katolika”, ankaŭ ĉe “Dia Regno” la numero de julio/aŭgusto 1914 restis provizore la lasta. La unua mondmilito interrompis la agadon de kristanaj esperantistoj. ☹



## Finrimarko el la unua numero de Dia Regno

“Estas evidenta, ke nia ĉiela sinjoro indulge benis la disvastiĝon de nia lingvo kaj ni povas diri, ke li bonece pretiĝis Esperanton je la servo inter Lia regno. Ni do havas permeson helpi per lia indulgo je la disvastiĝo inter nia tuta mondligo. Tamen ni ne devas konfidi al nia propra forto, tute ne! Esperanto ankaŭ tute ne devas fariĝi pasio je ni. Nia laboro nur devas esti kaŭzita per la amo al nia Sinjoro Kristo kaj Liaj fratoj.”

Estu do nia devizo:

Esperanto por la Dia regno!



# Ĉu Esperanto estas di-regna?

Origine publikigita en Espero Katolika 7-8/1984  
Kun afabla permeso

Claude PIRON, FR

**K**iu konatiĝas kun Dio, eĉ se nur treege parte (pli ol parte, kiu povus?), baldaŭ komprenas, ke en nia mondo troviĝas du tute malsamaj kategorioj de ekzistaĵoj: tiuj, kiuj favoras la iron al Dio, la alvenon de ties Regno, kaj tiuj, kiuj malfavoras ĝin. Kio kondukas al la regno de Dio, tion ni povas nomi “*di-regna*”.

Kompreneble, en multaj okazoj, la situacio ne estas simpla. En ĉiu el ni, ekzemple, fortoj diregnaj kaj kontraŭdiregnaj batalas inter si, kaj same en la socio, kaj same en multaj sferoj: ekzemple, en la literaturoj, en la tradiciaj manieroj eduki, en tiu aŭ alia politika doktrino, en la Eklezio. Tamen, la koncepto pri diregneco montriĝas utila, kaj povas esti interese ĝin apliki al esperanto.

## Atentigo pri la kriterioj

Por distingi, ĉu io estas diregna aŭ ne, ekzistas tuta serio da kriterioj. Sed antaŭ ol pritrakti ilin, ni devas noti, ke en io diregna agas fortoj, kiuj radias eksteren, kaj transdonas siajn kvalitojn, formante kvazaŭ reton de konstantaj interŝanĝoj. Rezulte, inter la diregna afero, individuo trafita de ĝi kaj la medio, en kiu ĝi renkontiĝas, troviĝas tiel intima rilato, ke vortoj mankas por esprimi la realon. Ekzemple, la medio, kiu subtenas la

diregnaĵon, samtempe estas subtenata de ĝi; simile, la individuoj, kiuj nutras ĝin, kaj sen kiuj ĝi ne ekzistus konkrete sur nia planedo, samtempe estas de ĝi nutrataj. Aperas do konstanta interŝanĝo de energio: multan energion la koncernej individuoj kaj medioj dediĉas al la diregna afero, sed ili per tiu agado mem mistere ĉerpas el ĝi abundan energion.

Pro tio, la kriterioj, kiujn ni ĉi-sube pritraktos, rilatos jen al la diregna afero mem, jen al la individuoj, kiuj sin donas al ĝi, jen al la medio en kiu ĝi vivas. Okazas fenomeno de harmonio: la diregnaĵo, la individuo kaj la komunumo kunvibras. La dia kvalito en io diregna ne estas difinebla; tial oni ne serĉu ĉi tie ian matematikan aŭ juran precizecon, la vortoj uzotaj ne povas rekte montri, ili nur elvokos kaj sugestos, tiel ke la nedireblaĵon, al kiu ili celas, vi povu intuicie koni. Se via koro estas malfermita al la transteraj realaĵoj, tio sufiĉos, por ke vi povu firme apliki la kriteriojn. Konsiderante ilin kiel erojn de unu tuto, vi faros al vi bildon ĝustan; vi sentos, ke ĉiuj *kursive presitaj vortoj* estas deirpunktoj de diversaj vojoj, kiuj konstante interkonektiĝas, kaj kondukas al unu sama, sed neesprimebla, Centro.

## Amo kaj justeco

Inter tiuj kriterioj, eble la plej evidenta,

el kristana vidpunkto, estas amo. Sed ne iu ajn amo. Amo poseda, inklina submeti al si la “amaton”, ne estas amo kristansence. Ni rigardas amo nur aman sintenon, kiu respektas la individuecojn, kaj kiu sekve favoras *unuiĝon de diversuloj*, tiamaniere, ke la koncernatoj, kvankam unuiĝintaj, tamen restas diversaj. Tial la modelo de amo estas la Triunuo: tri personaj estaĵoj, kiuj amas unu la aliajn tiel\*) tute, ke ili kunplektiĝas en unupersonan estaĵon, kiun ni nomas Dio.

Amo postulas ne nur respekton, sed ankaŭ *deziron koni kaj kompreni* la alian en ties vera esenco, kiel eble plej profunde. Ĝi do ne povus ekzisti sen dialogo inter kunparolantoj, al kiuj *egala digneco* estas agnoskita.

Krome, se la amo estas aŭtenta, ni deziras, ke la aliulo plene disvolviĝu laŭ propra naturo, ne laŭ nia ideo pri li aŭ ŝi. Tiu principo, kiu radikas en respekto, kondukas al justeco: neniam manku al iu tio, kion li rajtas havi, kaj neniam unu havu tro rilate al la “maltroo” de alia. Ĉirilate, kristanismo emfazas, kiel facile la etuloj, nekapablaj sin defendi, riskas esti preterlasitaj; tial ĝi instigas al *speciala atento al senpotenculoj*, etuloj, kripluloj, subuloj, viktimoj de diskriminacio, ĉiuj estaĵoj malestimataj kaj socie malfavoritaj.

Kiel ni ĵus vidis, amo enhavas la deziron, ke la amata persono aŭ estaĵo – la samo ja validas pri planto aŭ besto – kresku, disfloru, *disvolviĝu* en feliĉo, kaj produktu bonon, fruktojn feliĉportajn. Tiu emo helpi ke la latenta fruktodoneco de la amata disvolviĝu, montras, ke diregnecto inkluzivas ankaŭ *fekundecon*.

Kie troviĝas harmonio kun la dia regno, tie ĝenerale ankaŭ arta kreemo renkontiĝas: la Spirito estas fekunda kaj la amo, kiun Ĝi stimulas, nepre bezonas esprimiĝi per belo.

Kie do la Spirito inspiras – kio estas alia maniero priskribi tion, kion ni nomas “diregna” – tie ankaŭ viglas vivo. Se ni vidas sklerozon, rigidigon, tie ni ne frontas al io diregna. Tiu vivo pulsas mult-aspekte, jen pli interne, per profundigo de la propraj valoroj, aŭ per persista elteno dum la ĉirkaŭaj cirkonstancoj estas malfavoraj, jen pli ekstere per disvastiĝo, fondo de novaj ĉeloj, kiuj mem kreas novajn kaj tiel trasdonas plu tiun spirite riĉigan specon de vivo.



Beato Angelico: Sankta Laŭrenco disdonas almozon al malriĉuloj

“Kristanismo... instigas al speciala atento al senpotenculoj, etuloj, kripluloj...” (C. Piron).

“Mi laŭdiĝu, ne pro tio, ke mi, kiel pentristo, ŝajnis kvazaŭ dua Apelo, sed

ĉar mi fordonis ĉiujn miajn riĉaĵojn al vi, ho Kristo. La verkoj de unuj transvivas surtere; tiuj de aliaj enĉiele”  
(Sur la tombo de Beato Angelico)

Se oni troviĝas en diregna medio, oni tuj sentas tiun vivon en la ĉiea vogleco, kaj rido tie abundas, dum maloftas deprimiĝo. Tial alia kriterio de io diregna estas, ke ĝi favoras *ĝojon*; ĝi, per si mem, emas disradii etoson de gajeco.

Aŭtenta ĝojo neniam estas egoisma. Eĉ en siaj plej primitivaj, infanecaj formoj, ĝi serĉas *komunikiĝon*, transdonon. Per tio, ĝi rilatas ankaŭ al amo, kiu estas, finfine, feliĉkonstrua rilato. Tiu bezono krei feliĉon ĉirkaŭ si, kune kun la deziro kompreni, kunnaskas *kompatemon*, t.e. kunsenton pri sufero.



Beato Angelico: Kompatemaj virinoj sub la kruco de Kristo (detalo)

“Tiu bezono krei feliĉon ĉirkaŭ si... kunnaskas kompatemon, t.e. kunsenton pri sufero”  
(C. Piron).

“Onidire, frato Johano (Angelico) neniam tuŝis penikojn sen antaŭa preĝado. Neniam li pentris krucifikson, sen malsekigi siajn vangojn per larmoj;

tiel ke, el la vizaĝo kaj en la sinteno de liaj figuroj, oni vidas la virtecon de lia sincera kaj granda animo en la kristana religio”  
(G. Vasari, 1550).

Iom paradokse, ĝojo kunordiĝas kun *kapablo suferi*. La ĝojo disfloras ene de la diregna medio. Sed ĉar la ekstera

mondo tiun ofte ne komprenas, sed forĵetas, ĵaluzas aŭ timas, la kontakto kun la ekstero multfoje alprenas la formon de kolizio, kaj tiuokazaj batoj kaj streĉiĝoj estigas suferadon en tiuj, kiuj volas resti *fidelaj* al la diregna trezoraĵo. Io simila okazas, en individuo aŭ grupo, kiam konfliktras diregnaj kaj kontraŭ-diregnaj fortoj. Nur prenante la suferon sur sin akcepteme oni povas superi la konflikton. Kiu suferon antaŭakceptas, tiu vekas en si *kuraĝon*. Kio ja baras la vojon al kuraĝa ago, se ne la timo suferi?

### **Ĉu havi aŭ esti? Ĉu grandioza aŭ plej simpla?**

Al amo, al akcepto de sufero kaj al la emo transdoni ĝojon ligiĝas la volo servi, ĉefe al malgranduloj, ne serĉante profiton por si. Unu el la karakterizoj de io diregna sekve estas, ke ĝi estas *donema*. Fakte, homo kerne trafita de la diregnaĵo sin donas al ĝi kaj ni povas aldoni al niaj kriterioj ankaŭ *sindediĉon*.

La kapablo doni postulas, ke oni ne estu katenita al posedaĵoj. Efektive, io diregna estas *neligita al materio*, ĝi estas spirita, ĝi rilatas pli al la sfero de esto ol al tiu de havo. Mono, sekve, neniam povas esti celo de iu dediĉita al ĝi.

Kiu strebas havi pli ol esti iĝas kaptita de la emo posedi kaj ĝenerale bazos sian vivon sur la propra riĉiĝo: li metas la centron de sia aktiveco en sin mem. Tiu memcentreco, neakordigebla kun diregna agado, povas prezentiĝi subforme de orgojlo. Fakte, ĉi-lasta estas la origina kulpo, kiel klare montras la vortoj de l'serpento praardena. Rezulte, ni povas atendi, ke inter la kriterioj helpantaj juĝi,

ĉu io estas diregna aŭ ne, troviĝos *humileco*, *modesteco*. Sub ofte mizera, ridinde negrandioza ŝajno – ni pensu pri la naskiĝo de Jesuo aŭ pri la elekto de azeno por eniri Jerusalemon - kaŝiĝas io ege valora. Ĉu la Regno de Dio mem ne estis komparita al kaŝita trezoro? Sed por atingi tiun trezoron, necesas iĝi pura, seniĝi je multo kruda kaj balasta, rafiniĝi, forlasi la altajn komplikaĵojn de snobeco por fariĝi infanete *simpla*, kun malriĉo pli riĉ-enhava ol riĉeco, ofte ŝarĝita per superflujaj ornamaĵoj. En io diregna ĝenerale troviĝas ia kristaleca, pura kvalito. Ĝi estas *travidebla* kiel la ĉielo mem.

Materio estas ligita al spaco kaj tempo. Io diregna ne. Tial unu el la signoj, ke homa strebado harmonias kun la dia regno estas la ĉeesto en ĝi de *pacienco* kun ties kunulo *persistemo*. Ni ja konas la ĉielan paciencon. La pedagogio de Dio rigardas jarcentojn horoj, kaj ne forlasas sian celon pro tio, ke ĝi renkontas fortegajn kontraŭstarojn. Malligita disde tempo kaj spaco, diregnaĵo sekvas la ritmon de historio, ne de unu homa vivo aŭ de modo forflugonta, kaj ĝi strebas al spaco tutvasta, t.e. al *universaleco*.

## Venki pace

Ami, respekti, pacienci, kompreni alies suferon kaj rezigni la orgojlan tenton montri sin pli forta, ĉiuj ĉi trajtoj kune naskas unu plian: la rifuzon al perforto. Io diregna, laŭ la kristaj instruoj, ne neniigas siajn malamikojn en grandioza triumfa batalo. Ĝi venkas per kaj pro si mem, pro la propraj internaj kvalitoj, per la disradiado de propra ena bono. Fakte,

ĝi ĉiam agas diskrete, kiel apenaŭ spurebla fermento, kaj ĝi venkis per la vero.

Trompo uziĝas por submeti, sed vero liberigas. Kaj kiu respektas la aliulon, tiu lasas lin libera. Ni do enmetu *liberecon* en niajn kriteriojn, memorante pri la “libereco de la infanoj de Dio”. Tamen ni rimarku, ke ne temas pri iu ajn libereco, certe ne pri tiu libereco, kiu, manke de konsidero al la aliuloj aŭ de intelekta rigoro, kondukas al detruo kaj ĥaoso.



Hieronymus Bosch: la iluziisto (detalo)

“Trompo uziĝas, por submeti... Io diregna troviĝas malkomforte rilate al la sintenoj de la ĉirkaŭa mondo: sin deviginte respekti la veron kaj neniam perforte agi, ĝi malfacile povas defendi sin kontraŭ tiuj, kiuj juĝas supraĵe kaj preferas uzi mensogon...” (C. Piron).

Ne estas facile tuj kompreni, ke libereco postulas rigoron. Sed por liberigi sin de infekto, necesas, rezigninte la eraran opinion de tiuj, laŭ kiuj libero estus povi fari ion ajn, severe *obei* la regulojn de higieno. Kaj kiel la homoj



sukcesis liberigi sin de fiksiteco al Tero por atingi Lunon? Ĉu ne rigore studante la leĝojn de la universo (fizika, ĥemia, astronomia) kaj rigore obeante ilin?

Tiu harmoniigo de du aspektoj unuavide kontraŭdiraj - ĉi-kaze *libereco* kaj *rigoro* - estas tipa pri multaj diregnaj aferoj. Simila kunordigado retroviĝas inter ĝojo kaj sufero, simpleco kaj riĉeco (vera, interna riĉeco), *saĝo kaj frenezo* (saĝi laŭ eternaj normoj estas frenezi laŭ ĉi-mondaj), *racio kaj sentoj*, *grandeco kaj eteco* (ni pensu pri la grandeco de Dio, kreanto de ĉiuj ekzistaĵoj, enkarnigita en "fiaskinta" surkruca malfortulo aŭ en bebo en-manĝuja).

La nomitaj paradoksoj fakte rilatas al strebado solvi la konfliktojn per malkovro de pli alta vidpunkto. Al la diregna sfero tute certe apartenas la volo meti pacon tie, kie ĉiu el la kontraŭuloj volas trudi sin aŭ siajn ideojn. Feliĉaj la pacigantoj!

## De kalumnio al espero

Eble ĉar diregnaĵo malhavas la evidentaĵn allogon, brilon kaj potencon aspekton de tio, kio fascinas ĉi-monde, ĝi ofte estas malestimata kaj miskomprenata de la modokreantoj kaj de la amasoj, kiuj ilin sekvas, ĉar sekvi gvidanton estas pli facile kaj sekure ol mem kritike rezoni. Al la klarvidantoj, diregnaĵo montras la profundan superecon de io modesta super supraĵa brilo kaj delogantaj pseŭdosolvoj. Tiuj ĝiaj kvalitoj povas esti en granda parto de la publiko ĝenan pridubadon pri la kutima aŭ laŭmoda pensmaniero. Pro tio, ofte, oni *mokas, ridindigas, eĉ kalumnias* kaj *persekutas* ĝin. Pro la

propra esenco, ĝi ja ne povas konformiĝi al la postuloj de ĉi-mondo, ĉar tio estus nei sin mem; ĝi do rezistas, kaj tiu rezisto al konformiĝado vekas koleron kontraŭ ĝi en multaj ĉi-monduloj. Io diregna sekve troviĝas malkomforte rilate al la sintenoj de la ĉirkaŭa mondo: sin deviginte respekti la veron kaj neniam perforte agi, ĝi malfacile povos defendi sin kontraŭ tiuj kiuj juĝas supraĵe kaj preferas uzi mensogon kaj la tutan premon de sia ĉi-monda famo, potenco aŭ pozicio, ol fronti al la simpla, nuda vero.



Hieronymus Bosch: Kristo krucportanta (detalo).

“La di-regnaĵojn ofte oni mokas, ridindigas, eĉ kalumnias kaj persekutas” (C. Piron).

“Ĉio, kio estas nenormala kaj misforma, trafas kaj logas la fantazion de Bosch: ŝajnas, ke li sentas specon de malinklino al la harmonia regulo kaj al la skemoj simetrie aranĝitaj, dum male li sentas preskaŭ diablecan raviĝon por ĉia priforma arbitraĵo...” (M.J. Friedlinder, 1921).

Male al la eksteruloj, tiuj, kiuj spertis mem la diregnaĵon, sentis ĝian valoron tiagrade, ke naskiĝis en ili plena *fido* al ĝi; cetere, ĝi ne senluziigis ilin: kiom ajn modesta kaj mokata ĝi aperas, ĉe

elprovo ĝi fakte montriĝas *fidinda* kaj fortika. Nutrataj ĉe la sama fonto, la aliĝintoj emas fidi ankaŭ la sam-diregnaj-ulojn pli ol iun, kiu ne konas ĝin, ne partoprenas en ĝia vivo, ne ĝuis ĝian sekretan – t.e. rezervitan al spertantoj – plezurdonon. En tiu komuna kaj reciproka fido kuŝas la radikoj de *solidareco*.

Reziĝinte je trompo kaj perforta sintrudo, la diregna afero devas ĉerpi energion el io alia, nek memcentra, nek agresiva. Kiel amo, la ĵus priparolitaj fido kaj solidareco estas du el tiuj gravaj energifontoj. Alia nomiĝas *espero*. Espero estas kompleksa, tre matura sento, ĉar ĝi postulas samtempe, ke oni firme koncentru la rigardon al la celo, kaj ke oni tamen sciu, ke eble oni ne atingos ĝin. Se la celon oni neeviteble atingos, oni ne plu diras “mi esperas”, sed “mi estas certa”. Tamen, esperi estas tre efika sinteno. Malespero kondukas morten, dum obstina espero savas.

### **Konkludaj rimarkoj pri la kriterioj**

Noti ĉiun apartan kriterion certe estus neeble, sed la ĉefaj verŝajne estis ĉi-supre menciitaj. Gravas atenti, ke delikata ekvilibro necesas inter la diversaj aspektoj de diregna afero, el kiuj ĉiu nuancas kaj korektas la aliajn.

Ekzemple, se mankas humileco kaj ankaŭ respekto al la aliulo tia, kia li estas – t.e. alia, do malsama – tiaj elementoj kiel sindediĉo, akcepto de kalumnio kaj persekutoj, fido, solidareco kaj persistemo povas naski sintenon fanatikan. Simila sekta kvalito ne retroviĝas en io aŭtente diregna. Se mankas humileco kaj respekto, mankas io esenca, kio signifas, ke la esenco de la afero fariĝis

alia ol diregna. Sekve, por juĝi pri diregneco, oni kontrolu, ĉu la diversaj kriterioj harmonie kunordiĝas inter si.

Espero estas kompleksa, tre matura sento, ĉar ĝi postulas samtempe, ke oni firme koncentru la rigardon al la celo, kaj ke oni tamen sciu, ke eble oni ne atingos ĝin.

Tio ne signifas, ke necesas trovi ĉiujn kriteriojn kune, por ke io estu difinebla kiel diregna – ne ĉiu kriterio ja estas aplikebla al ĉiu kazo – sed ke neniuj trajtoj de la prijuĝata afero, agado, estaĵo aŭ kolektivo kontraŭu unu el la kriterioj. Fanatikeco povas esti klasita kiel nediregna, ĉar ĝi kontraŭas la kriteriojn “respekto”, “humileco” kaj “rezigno je perforto” (perforto kompreneble inkluzivas ankaŭ psikologian perforton).

Ni plue rimarku, ke verŝajne nenio surtera povas esti cent-procente diregna. Kiel ni vidis komence, ĝenerale fortoj diregnaj kaj kontraŭ-diregnaj retroviĝas samtempe en la sama loko, kolizie aŭ disŝire. Estas do saĝe relativece rezoni: ĉu en afero x diregnaj fortoj estas alte superaj al la kontraŭdiregnaj? Ĉu afero x estas pli diregna ol afero y?

Oni povas vortigi la situacion jene. La kriterioj, ĉi-supre revuitaj, kune signas iun ĝeneralan etoson. La demando sekve estos: ĉu la etoso de la koncerna afero, homo, grupo, politiko, konduto, ktp, havas ĝeneralan harmonion kun la etoso signita de la nomitaj kriterioj? Ekzemple, movado, kiu stimulas malammon, ne povas esti diregna, eĉ

se ĝi respondus al multaj el la aliaj kriterioj, ĉar instigo al malamo kreas etoson, kiu absolute ne povas akordi kun la diregna etoso, kia ĝi estis ĉi-supre prezentita.

### Kie situas Esperanto?

Ĉu esperanto estas diregna? Al tiu demando mi ne respondos. Mi lasos al vi, kara leganto, la plezuron respondi al ĝi per via propra meditado. Meditu unue pri ĉio ĉi-supre dirita. La kriterioj estas signitaj per vortoj presitaj *kursive*. Pensu pri la aferoj, kiujn vi konas kiel venantajn de Dio kaj kondukantajn al Li, laŭ viaj propraj religiaj spertoj kaj laŭ tio, kion vi trovis plene kredinda en via religia instruigo. Pensu ankaŭ pri la aferoj, kiuj klare kontraŭas la Regnon de Dio.

Se vi trovos, ke la kriterioj ĉi tie listigitaj estas pravaj, apliku ilin al la internacia lingvo, memorante la principon, ke oni juĝu arbon laŭ la fruktoj. De Esperanto vi povas konsideri tri aspektojn: (1) la lingvon mem, ekzemple el struktura vidpunkto; (2) ĝiajn devenon, komencan estiĝon kaj historion (kiuj estis la motivoj de Zamenhof, la cirkonstancoj de la naskiĝo de la lingvo, la obstakloj, kiujn ĝi renkontis kaj kiel ĝi reagis al ili...?); (3) la esperantistaron, kiel kolektivan portan-

ton de io laŭ ĝi tre valora, kion ĝi sentas sin respondeca transdoni al la homoj.

Ĉu, kaj kiel mi, vi trovos kelkajn el la nomitaj trajtoj en la lingvo mem? Por mi, ekzemple, esperanto enhavas ion puran, travideblan, kion oni malofte renkontas en homaj lingvoj (travideblas la analizo de la frazo, travideblas la signifo de multaj vortoj, kiel ekzemple *ne-re-san-igeb-l-a*: kaj ĉu, kompare kun la aliaj, esperanto ne estas lingvo multrilate senbalasta?). Simile, mi retrovas la kriterion “respekti” en la maniero, laŭ kiu Esperanto traktas la vortelemen-tojn: neniam radikoj estas detruata, misformata, perfortata por adaptiĝi al la postuloj de kompleksa signifo aŭ al sia rolo en la frazo; la lingvo konstante respektas ĝian integrecon.

Ĉu vi retrovos la kriteriojn de direg-neco ankaŭ en la estiĝo de nia lingvo? Ĉu ankaŭ en nia kolektivo, en la etoso de niaj renkontiĝoj, en la motivoj, kiuj allogas la plimulton el ni, ne ĉiam klare kaj konscie, al tiu por elksteruloj stranga sindediĉo? Ĉu iuj esperanto-medioj respondas al tiuj kriterioj, sed aliaj tute ne? Meditu, leganto, mia frato. Mian konkludon vi probable divenis. Intere-sus min scii, ĉu la via similos al ĝi. ☞

(\* Teologoj dirus: ”unuesenca” (n.d.R.)

**Claude PIRON** [Klod PiRO<sup>n</sup>] estis svisa esperantisto, naskiĝinta en 1931 en Namur (Belgio) kaj forpasinta la 22-an de januaro 2008 en Svisio. Li estis lingvisto kaj psikologo.

La teksto kaj bildo ĉerpita el Vikipedio.





## Seneliraj vojoj...

Jacques TUINDER, NL

*En eklezia gazeto mi legis pensigan fabelon, verkitan de Bert Voorhoeve. Ĝi klopodas konvinki nin pri tio, ke malantaŭ ĉiu pordo troviĝas 'vivo-indikiloj'. Ĉiuj homoj havas sian propran rakonton, kaj kelkfoje ili posedas pli da talentoj kaj kapabloj ol ili supozas. La mesaĝo evidentas: vivu, miru, simple komencu, faru ion kaj dividu ĝin kun aliaj! Neniu aŭdacu diri 'mi plibonigos la mondon', sed ni jam multe faras estante brulanta kandeleteto...*

**A**ntaŭ longa tempo vivis en fora lando neĉiutaga reĝino. Ŝi sidis sur majesta trono kaj reĝine regis sian regnon. Ĉiutage alfluis al ŝia trono homoj kiuj al ŝi rakontis pri la vojoj, laŭ kiuj ili iris en la vivo. Ofte ili plendis pri la multaj seneliraj vojoj en la regno. La reĝino faris al si multajn zorgojn ĉi-afere kaj finfine decidis forlasi sian tronon por mem entrepreni vojaĝon kaj esplori la situacion. Ŝi vestis sin kiel kutime vestiĝas ordinaraj virinoj en la lando kaj ŝtele-silente foriris el la palaco tra sekreta pordeto. Ŝi iris super altaj montoj kaj tra profundaj valoj.

Iutage la reĝino malkovris ke ŝi alvenas en sakstrato. Nu, la vojo kondukis ŝin al forĝejo. La reĝino fariĝis tiom fascinata pro la laborado per fero kaj fajro, ke ŝi longan tempon deĵoris ĉe la forĝisto. Kaj ŝi ekkomprenis la signifon de la proverbo, ke oni forĝu feron, kiam ĝi estas varmega. Kaj kiam aperis la momento de adiaŭo, la forĝisto donacis al ŝi gracian braceleton. "Portu ĝin dumvoje", diris la forĝisto, "ĝi donos al vi forton!"

La reĝino daŭrigis sian vojaĝon kaj denove sakstratiĝis ŝia vojo, kie el lasta domo ŝi aŭdis frapadon, ĉarpentadon kaj kantadon. Ŝi eniris la domon kaj rimarkis ke ŝi troviĝas en ŝufarejo. La laboro de la ŝuisto kaptis ŝian admiron, kaj la reĝino decidis ankaŭ ĉi tie resti kelke da tempo. Multaj ŝuoj pasis tra ŝiaj manoj, kaj tiel la reĝino ekkomprenis en kiom da diversaj manieroj la homoj en ŝia regno iradas tra la vivo. Per krudaj botoj, per montoŝuoj, per baletŝuetoj, eĉ ankaŭ per tute oblikiĝintaj sandaloj. La reĝino faris novajn kaj flikis malnovajn ŝuojn. Okaze de la adiaŭo la ŝuisto donacis al ŝi paron da specialaj ŝuoj. Ĉi ŝuoj helpu al ŝi per ambaŭ piedoj iradi sur la tero kaj ne paŝi piedfingre aŭ paradfiere.

La reĝino daŭrigis sian vojaĝon kaj iutage la irado denove stagnis. La vojo finiĝis apud farmodomo. Ankaŭ ĉi tie la reĝino restis sufiĉe longan tempon. Ŝi sarkis, plugis, semis, rikoltis kaj prizorgis la bestojn. Kaj ŝi lernis vivi laŭ la ritmo de la sezonoj. Nu, la iompostioma maturiĝado de la grenoj instruis al ŝi pacienci. Kiam ŝi adiaŭis

la farmiston, li donacis al ŝi saketon kun greneroj. Temis pri tre specialaj greneroj, ĉar ili malhelpu, ke neniam plu regos malsato en la regno.

Ankoraŭ kvaran fojon la reĝino atingis senelirejon. Finiĝis la vojo ja en granda ŝtonminejo. Flanke de la minejo staris modesta dometo. Ŝi frapis sur la pordo. Kiam ŝi malfermis ĝin, ŝi vidis maljunan viron kun vetersignita vizaĝo; ĉirkaŭis lin ĉiaj ŝtonoj. Jam baldaŭ la reĝino komencis haki, ŝlifi kaj poluri ŝtonojn. Kaj ŝi malkovris, kiel en la interno de malglataj kaj krudaj ŝtonoj briletas kaj fajreras kristaloj. Kiam la reĝino foriris, la ŝtonisto adiaŭis ŝin per donaco en la formo de kruda diamanto. Kaj li diris: "La

diamanto iam trembrilos kaj radios antaŭ ĉiuj loĝantoj de via regno".

Post longa vojaĝo la reĝino fine atingis sian palacon. Kaj tie ŝi rakontis al la homoj, kiuj vizitis ŝin, ke ankaŭ seneliraj vojoj povas krei vivon. Ŝi rakontis pri la fakuloj, kiuj scipovas forĝi feron, fliki ŝuojn, haki ŝtonojn kaj prilabori kampojn. Kaj kio okazis? Multaj homoj reiris hejmen kun la konvinko ke eĉ seneliraj vojoj ebligas novajn vojojn.

Kaj venis tago, en kiu la reĝino malkovris je sia granda ĝojo, ke pro la nova fido de la homoj la kruda diamanto komencas trembrili kaj radii, kaj ke la lumo reflektas per miloj da delikate poluritaj ebenetoj. ☸

## Ĝus aperis noveldono de *Preĝo por ĉiu Tago*

**J**e la lastaj tagoj de 2007 venis la noveldono de la preĝlibreto *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus. Singarde reviziis Siegfried KRÜGER kaj Albrecht KRONENBERGER la tekston. La libreto ampleksas 96 paĝojn kaj ĉiu tago havas sian dediĉitan preĝon. La formato estas 10x15 cm.

KELI prizorgas la reeldonon kun afabla permeso de la infanoj de la verkistino. Ĉiu enspezo de la vendado iras rekte al EVIDENTE por subteni ties agadon inter vidhandikapuloj.

Jacques Tuinder, NL, dediĉis pli ol 40 jarojn de sia vivo al la batalo kontraŭ nenecesa/evitebla blindeco en la mondo pere la fonduso EVIDENTE. Kiel kristano instigis lin Jesuo, kiel esperantisto la okulisto L.Zamenhof.

Vi mendas la libreton ĉe la sekretario de KELI kaj la prezo estas laŭ libervola donaco por la laboro de EVIDENTE.

Mendu ĉe Pavel Polnický;  
Na Vinici 110/10,  
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;  
+420 325 615 651;  
cea.polnicky@quick.cz





## Ĉu aktuala la londona esperantigita Biblio?

Armando ZECCHIN, IT

**C**i tie nek interesas nin la aktualeco de ĝia esperanto, sed ties adekvateco al la originala teksto, nek interesas nin ĝenerala juĝo el tiu vidpunkto. Altiras nian atenton, ĉi-momente, specifa punkto de tiu adekvateco, atentigita de kulturaj kaj religiaj cirkonstancoj tiutagaj. Ne nur specialistoj pri bibliaj tekstoj kapablas sperte konstati kaj kleriĝi, sen sin senti tro fremdaj, ke el iu versiklo onin trafas la vortoj *'hipostasis/substantia'* kaj *'ĉlenkos/argumentum'* (la unua termino estas greka, la dua latina). Kiel oni tradukus al esperanto tiujn terminojn?

La skolo laŭ Lutero interpretis la unuan (hipostasis/substantia) ne laŭ objektiva senco (kiel, do, realaĵo ĉeesta en ni) sed subjektivsence kvazaŭ vortoj esprimantaj internan sintenon de la kredanto; kaj la duan (ĉlenchos/argumentum) kiel internan dispozicion (oni bonvolu ignori la teologiajn deduktaĵojn el tia duobla interpreto). Al tiu ĉi interpreta tezo finiĝis adheri ankaŭ la nova Biblio de la ekumena germana komisiono, kun aprobo kaj de evangeliaj komunumoj kaj de katolikaj episkopoj.

Sed jen la novaĵo. En la lasta encikliko (SPE SALVI facti sumus: SAVITAJ ni estis en la Espero) de la nuna papo, en la numero 7a estas dirate ke tiu interpreto 'subjektiva', jam akceptita en tiu ekumena Biblio, kvankam en si mem neerara,

ne esprimas tamen la tekstan sencon kaj fakte estas *jam rifuzita ĝuste de evangelianaj ekzegezistoj*.

Temas, kiel jam klaras, pri la versiklo unua de la ĉapitro dekunua de la Epistolo al la Hebreoj kiun ni hastas reprodukti esperantigita, nome en la esperanto de la La Nova Testamento de la Londonaj-Edinburgaj esperantigistoj. Ja, tiuskolaj tradukistoj, kiuj certe konis la kverelon ekzegeza-teologian, kiun kriterion sekvis, ĉu tiun de la subjektiveco aŭ objektiveco? Ili tiel tradukis: "*Kaj la fido estas realigo de esperataĵoj, provado de ne vidataj*". Realigo = objektiva realaĵo; provado = montrono-konstato.

La subjektiva tiel sonus: "*Fido estas: resti firme en kio esperata, esti konvinkite pri kio nevidata*".

Ĉu ne ŝajnas ke tiuj niaj antaŭuloj meritas la kuponeton de la moderneco kaj aktualeco? ☞


Heb 11,1

*Traduko laŭ Luther:*

Der Glaube aber ist eine Verwirklichung dessen, was man hofft, ein Überfŕhrtsein von Dingen, die man nicht sieht.

*Traduko laŭ King James:*

Now faith is the substance of things hoped for, the evidence of things not seen.



## 58-a kongreso de KELI

hotelo ESPERANTO Pribylina, Slovakio  
28. 7. – 4. 8. 2008 (notu: lundo ĝis lundo!)

Temo: **Dia Regno**

Pli da informo ĉe la sekretario:

Pavel Polnický,

Na Vinici 110/10; 290 01 Podíbrady, Ĉeĥio

Telefono: 420 325 615 651

E-mail: cea.polnicky@quick.cz



## 2-a listo de aliĝintoj:

- |                       |            |                         |            |
|-----------------------|------------|-------------------------|------------|
| 13. Tichý Pavel       | Ĉeĥio      | 28. Schaefer Karl Heinz | Germanio   |
| 14. Vencľ Jighí       | -"         | 29. Lundkvist Arne      | Svedio     |
| 15. Stamm Sieglinde   | Aŭstrio    | 30. Párkányiné Kaszab   | Hungario   |
| 16. van Ganswijk Wil  | Nederlando | 31. Banáti Katalin      | Hungario   |
| 17. Bardocz Erika     | Hungario   | 32. Schaap-Glas Elly    | Nederlando |
| 18. Rehm Britta       | Svedio     | 33. Scurt Gabriel       | Rumanio    |
| 19. Lászlo Maria      | Rumanio    | 34. Mihut Petru         | Rumanio    |
| 20. Tontea H. Vanessa | -"         | 35. Pospíšil Václav     | Ĉeĥio      |
| 21. Scurt T. Ildikó   | -"         | 36. Pospíšilová Ria     | -"         |
| 22. Scurt Gavril      | -"         | 37. Kazdera Milan       | -"         |
| 23. Martin Elizabeta  | -"         | 38. Klimeš Pavel        | -"         |
| 24. Martin Joan       | -"         | 39. Klimešová Pavla     | -"         |
| 25. Fazakas Ildikó    | -"         | 40. Tuinder Vera        | Nederlando |
| 26. Balog Maria       | -"         | 41. Tuinder Jacques     | -"         |
| 27. Farkas Antal      | -"         | 42. Majerský Miroslav   | Ĉeĥio      |



## Unu leterkarto

Mu Binghua, Ĉinio

**F**oje mi legis tri bonajn disertaciojn. Mi tre miris pri la aŭtoro, kiu estas nur pli-ol-20-jara, sed jam faris analizon saĝan kaj trafan al pluraj malfacilaj problemoj. Sendube li estas talenta ŝatanto de matematika scienco.

Ankaŭ mi okupiĝas pri instruado de matenatiko kaj scias, ke la disertacioj estas kun edifa karaktero kaj povas helpi nin por daŭre esplori kaj fine solvi amason da novaj problemoj. Mi deziris al mi, ke baldaŭ mi legu pli da liaj verkoj.

Mi tre volis diri al li mian ideon, sed samtempe sentis min embarasita. Mi, kiel konservativa ĉino, sen pripensio skribi leteron al fremdulo por esprimi mian opinion kaj dankemon, laŭ ĉina moro ne estas taŭga. Sed se mi silentas kaj neakurate donas al sukcesinto mian gratulon, ŝajnas al mi, ke ankaŭ tio estas riproĉinda. Nun mi vere en mia menso ricevis lian sugeston kaj liaj valoraj disertacioj stimulis mian cerbon, do kial mi ne diru al li mian sinceran dankon?



Por la novaj vidpunktoj de la junulo mi havas nenian motivon ne esprimi mian admiron kaj subtenon.

Poste mi sendis al li poŝtkarton, per kiu mi prezentis mian dankon. Li reciprokis al mi kun saluto. Mi ne plu kontaktis lin.

Unu jaron poste, fama eldonejo en lia lando eldonis elektitajn verkojn de liaj disertacioj. Speciale li donacis al mi ekzempleron.

Kiam mi foliumis tiun verkaron, surprizite la jenaj vortoj en la antaŭparolo eniris miajn okulojn.

”Tiam mi ricevis tre delikatan leterkarton el Ĉinio. Mi pendigis ĝin antaŭ mia skribtablo kaj ofte rigardis ĝin dum la tuta jaro. Pro la kuraĝigo deveninta de la fora lando mi estis tre kortuŝita. La granda kuraĝigo ĉiam akompanis mian verkadon kaj lasis min forgesi lacecon. Oni esperas ke mi verku pli da bonaj artikoloj, mi nenial vanigas ilian esperon. Ĉiufoje, kiam mi sciis ke iu leganto ricevis inspiron el miaj verkoj, mi sentis senkomparan ĝojon kaj tiam senescepte mia dezirego verki tuj leviĝis.”

Se mi ne skribus tiun dankan leterkarton, mi ne dubas, ke al la juna aŭtoro dum lia verkado certe mankus porcio da progresiga forto. ☸





## Prediko preparita por la ekumena kongreso en Pelplin 2007.

Erikas LAICONAS, Litovio

Tiu homilio estis preparita por la kongreso. Bedaŭrinde, mia sanstato plimalboniĝis kaj antaŭ la kongreso lunde falis teren kaj devis veturi al la malsanulejo, kie min oni esploris 16 diurnojn. Mia amiko Siegfried skribis kaj proponis la homilion al la revuo "Dia Regno". Se li pensas, ke ĝi estas taŭga, mi ne kontraŭas. Mi nur ege bedaŭras, ke mi ne povis partopreni la kongreson kaj renkonti miajn malnovajn geamikojn. Eble tio povis esti la lastan fojon, sed niaj deziroj ne ĉiam estas pravaj. La Plejaltulo diris – sufiĉe, kaj mi restis hejme. Koran dankon al prezidantino de la loka komitato s-ino Jadwiga Wasiuk pro la alsendita materialo por la partoprenintoj. Ĝi faris al mi grandan ĝojon. Sukceson al vi – la legantoj de la revuo "Dia Regno".

Erikas Laiconas – Luterana pastoro.

Jen semisto eliris, por semi; kaj dum li semis, iuj semoj falis apud la vojo, kaj la birdoj venis kaj formanĝis ilin; kaj aliaj falis sur ŝtonajn lokojn, kie ili ne havis multe da tero; kaj tuj ili ekkreskis, ĉar ili ne havis profundecon de tero; kaj kiam la suno leviĝis, ili brulsekiĝis, kaj ĉar ili ne havis radikon, ili forvelkis. Kaj aliaj falis inter dornojn, kaj la dornoj kreskis kaj sufokis ilin; kaj aliaj falis sur la bonan teron, kaj donis frukton, jen centoble, jen sesdekoble, jen tridekoble. Kiu havas orelojn, tiu aŭdu. (Mat. 13,3 – 9).

**K**araj gefratoj, La legaĵo, verŝajne, al vi estas konata kaj multfoje aŭdita. Kaj kial mi elektis ĝin por hodiaŭa homilio? Pasintjare mi predikis en Estonio dum BET-40 kaj predikis pri familio, ĉar laŭ mia opinio en mia lando la situacio estas malbona. Reeĥo venis el Finnlando kaj mi eksciis ke la situacio estas aktuala ankaŭ por finnoj. Do, la temo ankaŭ hodiaŭ koncernos proksiman problemon.

Jesuo ofte parolis per paraboloj. Tion Li faris por tio, ke la aŭskultantoj pli

bone komprenu, kion Li volas diri. Hodiaŭ la parabolo temas pri terkulturado. Do verŝajne pro tio, ke tiutempe la plej grava okupiĝo estis terkulturado. Interese, ke oni parolas pri la semisto, sed ne pri semanto. Tiutempe en juda familio ĉiu membro de la familio havis apartan laboron, do ankaŭ semis ne iu ajn, sed tiu, kiu ordinare tion faris kaj estis specialisto de tiu fako. Do, semis bone, sed okazis, ke iuj semoj falis ne tien, kien li volis, sed hazarde en iun alian lokon t.e apud vojon. En Izraelo

kampoj estis ŝtonozaj kaj iuj partoj estis kulturataj (kompreneble per tiaj ne perfektaj iloj nur ĝis 10-centimetra tavolo); en aliaj lokoj kulturaj kampon estis malfacile kaj krom kulturaj kreskaĵoj estis ankaŭ dornoj. Nuntempe en la vilaĝoj estas kulturataj kampoj kaj ni ilin nomas agroj.

Sed Jesuo volis paroli ne pri kulturado de la kampoj, sed pro la aktuala anima situacio. Tiam multoj ne vivis laŭ la dek ordonoj de Dio. Mi pensas, ke ankaŭ hodiaŭ estas simila situacio. Kvankam ni havas tre bonan heredaĵon – la Bibliion, kaj multoj scias pri tiu, iuj legis ĝin, aliaj ne, sed la ebleco legi troviĝas. Bedaŭrinde pro la amasa ilaro: televido, ĵurnaloj, revuoj k.s. satano semas multajn fiherbojn en la animojn de la homaro.

Nun multe oni parolas pri demokratio, pri homaj rajtoj. Sed kiu povas precize diri kio estas demokratio? Ĉu la dek ordonoj de Dio kontraŭas demokration? Kiu estas diferenco inter demokratio kaj anarĥio? Ĉu demokratio subtenas la homajn rajtojn, aŭ ni bezonas anarĥion por homaj rajtoj? Jen kiom multaj demandoj, kiuj afektas nin. En la monato majo ni vidis pere de la televido kiam en Moskvo oni volis organizi samseks-emulan marŝon, sed la loĝantoj kontraŭstaris la aranĝon. Samon oni volas organizi en nia lando. Kial? Kial oni pretendas iri kontraŭ la volo de la loĝantaro? Ĉu tio temas pri homaj rajtoj aŭ pri propagando de kontraŭkristana vivmaniero, satana vivmaniero? Difekti junularon, infanaron? Se iu malpurigos la straton ne uzante necesejon tio estus lia rajto? Do tio estas radikoj de anarĥio. Ĉiu devas vivi laŭ iuj reguloj, bonorde

kaj por ĉio estas limoj. Trafe ĉijare diris ortodoksa patriarĥo en Moskvo, ke venas antikristo armita per homaj rajtoj.

La dek ordonoj de Dio estas bazitaj sur amo; amo al Dio, nia Kreanto kaj amo al homo, amo al nia proksimulo. Tion ni legis en la unua epistolo de apostolo Paŭlo al Korintanoj 13 ĉapitro. Tie nenio estas skribita pri sekso, sed nuntempe multoj miksas vortojn ami kaj volupti. Amo estas fundamento por la komuna vivo, por familia vivo. Mi aŭdis, ke en Litovio estas nur triono de normalaj familioj. Aliaj estas kunvivantoj, praktikantoj liberan vivon, kvazaŭ brutoj pariĝas kaj vivas sen iu ajn respondeco; sen respondeco kontraŭ naskitaj infanoj, kiuj plej ofte poste aperos en ŝtataj infanejoj. Ili kiel plenkreskuloj serĉas siajn gefratojn, ne gepatrojn, sed nur gefratojn.

Eble mi vane al Vi parolas pri tio? Do, Vi venis ĉitien kredantoj, kristanoj. Mi konsentas, sed ankaŭ kredantoj faras pekojn, iam forgesas siajn devojn aŭ hazarde pekas. Nur Jesuo Kristo ne pekis. Peko ne estas nur fari ion malbonan, sed ankaŭ ne fari tion, kion la kristano devas fari. En la 28-a ĉapitro de Mateo ni legas: „*Iru kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito; instruante ilin observi ĉion, kion mi ordonis al vi.*“ (Mat 28,19-20). Ĉu ni plenumas tion? Mi ofte renkontas homojn, kiuj diras: Mi estas kristano, sed ne praktikanta. Mia patro estas kristano, mia patrino estas kristanino kaj mi estas baptita; ĉu mi ne estas kristano? Kion ni povas respondi al simila penso? Mi diras: Mi estas vegetarano, sed ne prak-

tikanta. Tio ĉi sonas simile kaj kompreneble. Kiu ne manĝas, tiu mortas.

Ne praktikanta kristano similas al kampo, kiun neniu prizorgas kaj ĝi estas plena de fikreskaĵoj, dornoj. En tia koro vorto de Dio estas forgesita kaj ne donas frukton. Tia homo ne povas eduki sian familion, ĉar mem ĉion forgesis. Lia animo aŭ mortis, aŭ preskaŭ mortis. Li nepre devas doni sanktan manĝaĵon, vorton de Dio, al sia koro, al sia animo. Ni kongresas tie ĉi el diversaj landoj. Parolas unu lingvon. Ni estas unu granda familio. Sed nia devo estas disĉipligi ĉiujn naciojn. Tion postulas Jesuo Kristo de ni. Do ni estas misiistoj kaj reveninte hejmen ne rajtas tion forgesi. Junularo eble dirus: Mi estas juna kaj por mi estas multe da tempo. Pri la lasta momento

pensu la maljunuloj. Sed dum tiom teknika tempo kiel maljuna tiel ankaŭ juna homo povas morti. Kaj kio sekvas? Ĉu ni iros en Dian Regnon? Tion scias nur la Plejaltulo. Ni havas nur esperon.

Apostolo Paŭlo en la epistolo al korintanoj skribas: *“Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek malmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj heredos la regnon de Dio.”* (I Kor. 6, 9-10). Do, listo estas longa. Ni devas pripensi, ĉu ni ne estas inter ili, ĉu niaj proksimuloj, parencoj, geamikoj ne estas inter ili. Eble ili bezonas nian helpon? Kio povas helpi al ili? Nur amo, certa amo; Amo al Dio kaj amo al nia proksimulo. Amo regu inter vi ĉiuj. Amen.

**P**astoro Erikas Laiconas el Kaunas (Litovio) mortis je 28.1.2008 en la 80-a vivojaro. KELI ne scias ĉion el la vivo de ĉi tiu profunda kristano kaj esperantisto. Post partopreno en KELI-kongreso li invitis en 1995 al Ekumena Kongreso en Kaunas. Ek de tiam KELI havis daŭran kontakton kun li. La E-Misio de KELI serĉis tiutempe novan prizorganton kaj li estis preta transpreni la materialon el Pollando. Montriĝis, ke tiu tasko superis siajn fortojn, ankaŭ pro manko de kunlaborantoj. Sed tamen ni subtenis lin iomete finance por gvidi E-Diservojn en Litovio. Pro la aĝo li intencis lastan fojon partopreni la Ekumenan Kongreson 2007 en Pelplin (Pollando) kaj preparis ankaŭ diservon. Pro subita apopleksio li devis resti en malsanulejo kaj ne povis partopreni. De kuracisto li ricevis la konsilon, akcepti koroperacion por gajni eble 5 vivojarojn. Erikas rezignis kaj lasis al Dio la decidon pri la vivofino.

Ni eksciis pri la forpaso unu tagon antaŭ la entombiga ceremonio je 31.1.2008 pere de la prezidanto de la Litovia Esperanto-Asocio. Pere de li ni povis ankoraŭ mendi florkronon kun rubanda surskribo: Jesuo diras: *Mi vivas, tial ankaŭ vi vivos* (Joh.14.19).

Li ripozu en paco.  
Siegfried Krüger, DE





**J**e la komenco de la Bibliojoj disdonitaj de la Gideon-anoj oni trovas ne nur la tabelon de la enhavo, sed ankaŭ indikilojn pri:

- Rekomenditaj bibliaj tekstoj por baza instruoj
- Gvidilon por helpemaj tekstoj en diversaj vivsituacioj.

Gideon-anoj estas unuiĝo de kristanaj komercvojaĝantoj, fondita en Usono 1898. La Gideon-anoj estas membroj de evangeliaj eklezioj, liberaj eklezioj kaj komunecoj, kiuj misias per disdonitaj Bibliojoj kaj Novaj Testamentoj en hoteloj, pensioj, atendejoj de kuracistoj, malsanulejoj kaj prizonoj. La unuiĝo laboras en pli ol 170 landoj kaj disdonis ĝis nun pli ol 700 milionojn da Bibliojoj kaj Novaj Testamentoj.

Gideon estis gvidanto de malgranda grupo da viroj, kiuj estis pretaj, servi al Dio (la malnova testamento, libro de Juĝistoj, ĉapitro 6 kaj 7). Per ili Dio povis multe fari por sia popolo Israelo.

### **Rekomenditaj tekstoj por baza instruoj**

#### *Dia fundamento*

La surmonta prediko	Mat 5 - 7
La ora regulo	Mat 7,12
La granda ordono	Mat 22,36-40
La justeco	Rom 3,19-28
La reĝa leĝo	Rom 13,8-10; Jak 2,8
La nova ordono de Kristo	Joh 13,34-35
La perfekta amo	I. Kor 13
La amo de Dio	Joh 3,16; Rom 5,8

## Gvidilo de la Gideon-anoj

Kontribuis Siegfried KRÜGER, DE

#### *Bazaj instruoj*

La kulpo de la homo	Rom 3,23; I. Joh 1,8
Konvertiĝo kaj pentofaro	Luk 5,31-32; 15,10-24
La nova naskiĝo	Joh 3,1-7
La praviĝo	Rom 5,1; Efe 2,8-9
La eterna vivo	Joh 5,24; I. Joh 5,12-13

#### *Jesuo Kristo*

La bona paŝtisto	Joh 10,1-18
La naskiĝo	Luk 2
Humiliĝo kaj altiĝo	Flp 2,5-11
La releviĝo	Ago 10,39-41
La releviĝo de la mortintoj	I Kor 15,3-8.20
La reveno	I. Tes 4,16-18
La lasta juĝo	Apo 20,10-15; Rom 1,18
La nova ĉielo, la nova tero	Apo 21,22

#### *Praktikaj reguloj*

La vivo de kristano	Joh 15
La respondeco de kristano	I. Pet 3,15; 4,10
La ĝusta preĝado	Flp 4,6-7
La "Patro Nia"	Mat 6,5-15

### **Helpemaj tekstoj en diversaj vivsituacioj**

Amareco	I. Kor 13
Dankemeco	Psa 100 I. Tes 5,18 Heb 13,15
Decidiĝo	Psa 55,23 Jak 1,5-6
Depresio	Psa 34; 42,6-12
Dubo	Mat 8,26 Heb 11
Eterna vivo	Joh 3,3 Joh 3,16

Frustracio	I. Joh 5,9-13 Psa 41,9-13 Luk 17,3-4 Rom 12,14.17.19.21	Preĝado	Mat 6,9-13 Luk 11,1-4 Efe 6,18 Flp 4,6
Komplikaĵoj	II. Tim 4,16-18 Psa 31; 43; 50,15 Joh 14,1-4 Rom 8,31-39	Protektbezono	Psa 18,1-3 Psa 34,7-9 Psa 27,1-6
Krizo	Heb 7,25 Psa 121 Mat 6,25-34	Protekto	Psa 121
La vera ĝojo	Heb 4,16 Luk 10,20 Flp 4,4	Sendankemo	Psa 100 Heb 13,15-16
La vera libereco	Gal 5,1.13 Rom 8,21 Joh 8,36	Senespereco	Psa 42,5 Heb 11
La vera paco	Efe 2,14-17 Flp 4,7	Senfortiĝo	Psa 90,13-17 Mat 11,28-30
Malfeliĉo	Psa 91 Psa 118,5-6 Luk 8,22-25	Senhejmeco	I. Kor 15,58 Psa 121 Mat 10,16-20
Malkvietiĝo	Psa 1 Jak 1,12-15 I. Kor 10,6-13	Senkuraĝeco	Psa 23 Psa 55,23 II. Kor 4,8-18 Flp 4,4-7
Malpaco	Joh 16,33 Rom 5,1-5 Flp 4,6-7	Soleco	Psa 23 Heb 13,5-6
Malsaneco	Jak 5,14-15 Rom 8,28.38.39 II. Kor 12,9-10	Sufero	Mat 5,4 II. Kor 1,3-4 II. Kor 12,8-10 Heb 12,3-13 Psa 91
Malsupereco	Rom 8,31-39	Tento	Psa 1; 139,23-24 Mat 26,41 I. Kor 10,12-13 Jak 4,7
Maltrankvilo	Mat 6,25-34 I. Pet 5,6-7 Psa 4 Flp 4,6-7 Joh 14,27-31	Timo	II. Pet 2,9; 3,17 Psa 46 Joh 16,33 II. Kor 4,8-18
Melankolio	Psa 23 Mat 11,28-30 II. Kor 1,3-5	Tristeco	Mat 5,4 Joh 14 II. Kor 1,3-4 I. Tes 4,13-18
Mizero	Psa 34,7 Psa 86,6-7 Psa 50,15	Vivkonsiloj	Rom 12
Peko	I. Joh 1,7; 2,2 Psa 32,1-8 Psa 51; 103 Sen 28,13	Vojinstrukcio	Psa 32,8 Sen 3,5-6 Psa 46
		Zorgo	Mat 6,25-34 Flp 4,6-7 I. Pet 5,6-7

# Informoj

Jen ĝojiga kaj kuraĝiga informo por ĉiuj kristanaj esperantistoj: La germana prezidento Horst KÖHLER distingis la katolikan pastron Bernhard EICHKORN per la ordeno “Federacia Meritkruco” (“Bundesverdienstkreuz”). Per tio li honoras lian multjaran per-esperantan agadon por ekumenismo kaj kompreniĝo inter la popoloj.

La solena transdono de la ordeno okazos la 20-an de majo en la sudgermana urbo Villingen.

Tre koran gratulon al vi, kara pastro Bernhard, kiu plene meritas tion.

Amike Ulrich MATTHIAS

Karaj anoj de KELI kaj IKUE, Skribis al mi Roger Rasolofo, veterano de la malagasa movado. Lia edzino estas elektita paroĥestro de kvar preĝejoj en Morondava, kaj li mem ricevis permeson instrui Esperanton en tiu medio. Li varbis 45 interesiĝantojn kaj li petas diskonigi tiun sukceson kaj instigi tutmondajn kristanajn esperantistojn sendi salutvorton al lia adreso:

Roger Rasolofo; B.P.168;  
619 Morondava; Madagaskaro

Rasolofo ne estas atingebla per retroŝto. La ordinara poŝto vojaĝas malrapide. Norma daŭro estas du monatoj (unudirekta veturo). Mi esperas ke vi bonvolos diskonigi la informon.

Dankon kaj korajn salutojn, Hans BAKKER



## S-ino Hilda THARME

1921 - 2007

KELI-ano Hilda Tharme, el Bangor, Kimrio, forpasis en Aprilo 2007. Kvankam jam membro dum multe da jaroj antaŭe, ŝi aliĝis kiel dumviva membro en 1970. Anglikano, ŝi estis ano de la Eklezio en Kimrio kaj lojala subtenanto de la interkonfesiaj Esperanto-diservoj en urbo Conwy, kiam Eric Revill gvidis ilin.

Emerita instruistino, ŝi vere alte taksis sian esperantistecon, uzante dum jardekoj la lingvon parole kaj skribe. Dum la sepdekaj jaroj ŝi instruis Esperanton kun entuziasmo en lernejo en Bangor kie ŝi havis postenon. Ĉefe ŝia instruita fako estis religio, kiun ŝi ne instruis el vidpunkto de katekizisto, sed kun klarigoj pri la rilato inter kredo kaj ĉiutaga vivo.

Tom Neil (kun dankoj al Hilary Chapman)



## S-ro Erikas LAICONAS

1928-06-11 – 2008-01-28

**L**a 28an de januaro 2008, en 80a vivojaro en Kaŭna hospitalo de la Ruĝa Kruco nin forlasis veterano de litova Esperanto-movado Erikas Laiconas [Erikas Lajconas].


Li naskiĝis la 11an de junio 1928 apud latva limo ĉe rivero Apaĉĉia, en vilaĝo Bliūdžiai norde de urbo Biržai, centro de litova evangelia-reformacia eklezio. Fininte mezlernejon li ekstudis en la Kaŭna Agrokultura Akademio kaj atingis postenon de docento en ties Hidromelioracia (akvogrundologia) fakultato. En 1958 li lernis Esperanton memstare kaj aliĝis al E-rondeto ĉe Kaŭna Instruista Domo. En 1980 E.Laiconas estis elektita ties prezidanto. Inter liaj meritoj menciindas organizado de pluraj imponaj E-eventoj klubo- kaj urbo-skalaj.

En 1988 laborante en vojaĝagentejo “Esperantotur“ E. Laiconas ekkonis pastron Adolf Burkhardt kaj dediĉis sin al KELI-movado. E.Laiconas fariĝis peranto de la revuo “Dia Regno” por Litovio, aktive partoprenis Ekumenajn Kongresojn, studis teologion en Riga. La 21an de majo 1998 li estis ordinita pastro de evangelia luterana konfesio kaj multe laboris priservante plurajn disajn paroĥojn. Kapabla unuigi diversajn homojn E. Laiconas estis adepto de la ideo pri unueco de ĉiuj kristanoj kaj celebris multajn ekumenajn diservojn en la lingvoj litova kaj Esperanto. Krome li parolis lingvojn latvan, anglan, rusan, iom la germanan kaj polan.

Malgraŭ okupateco en pastra laboro li konstante zorgis pri E-eldonaj aferoj. En 2000 li estis membro de Redakcia Konsilio de “Litova Stelo”. Li eldonis kelkajn numerojn de “Litovia Kristano” (por grupanoj de Biblia studo), materialon por E-ekskurso tra urbo Kaŭno. En 2004 li aperigis libreton “Momentoj de la vivo de M. Luther sur la provizoraj monbiletoj” (en Esperanto kaj en litova lingvo). Temas pri priskribo de monbiletoj, kiuj funkciis en Germanio post la unua mondmilito kaj enhavis tekstojn kaj bildojn pri M. Luther.

La forpasinto estis sepultita en evangelia luterana preĝejo en Kaŭna malnovurbo najbare de la Zamenhofa domo. La entombigo okazis la 31an de januaro en tombejo Eiguliai. Sur la lasta vojo, lian ĉerkon akompanis pli ol cent personoj, inter ili episkopo de Litova evangelia luterana konfesio Mindaugas Sabutis, dek pastroj kaj dek samideanoj. La episkopo dum sia adiaŭa parolo multfoje menciis ligojn de E.Laiconas kun Esperanto. Al proksimuloj de E.Laiconas kondolencojn esprimis prezidanto de LEA Povilas Jegorovas.

(nekrologo de Litova Stelo, iom mallongigita)



## Se donas Di' al vi favoron *La Gaja Migranto*

Germana originalo: **Wem Gott will rechte Gunst erweisen**  
*Der frohe Wandersmann*

- 1. Se donas Di' al vi favoron,  
Li sendas vin for el la dom',  
Por montri sian mirlaboron,  
La belan mondon, al la hom'.*
- 2. De l' montoj riveretoj fluas,  
Alaŭdoj kantas super mi;  
Mi ankaŭ gajan kanton bruas  
Al la tutmonda harmoni'.*
- 3. Al Dio fidas mi kun ĝojo.  
Li zorgas pri la tuta ter':  
Li ankaŭ min, sur mia vojo,  
Eterne gardos de danĝer'.*

Verkis (germane): **Joseph von EICHENDORFF, 1822**

Esperantigis: **Ludoviko Lazaro ZAMENHOF**

Melodio: **WEM GOTT WILL**

Komponis: **Friedrich Theodor FRÖHLICH, 1833**

Fonto : **TK 29, Ad 917, HE 107**